

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 13, Decembro 2018

*Al la tuta mondo:*

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*



*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

*[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)*

## Enhavo

Enhavo.....	2	TEJO – Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.....	14
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Divenu la svedan urbon/lokon! .....	14
EspePorko meditas.....	3	La Gotenburga Gazeto pri Komerco kaj Marveturado.....	15
Respondo al demando pri la vortoj lapono kaj sameo .....	3	S A Hedlund, 1821 – 1900.....	16
Ĉu komuna Nordia esperanta gazeto, estontece?? .....	4	Viktor Rydberg 1828 – 1895 .....	17
Kiu estis Bahá'u'lláh kaj kio estas bahai? .....	5	La koboldo.....	17
LärOlika .....	6	La kristnaska garbo .....	18
La knabo kun la stelo de David .....	7	Pirola, kiun mi memoras.....	18
Du poemoj de la verkistino Lisbeth H. Johansson, Gotenburgo .....	8	Vintrotago .....	19
Nova ekskurso kun birdobservantoj .....	9	Strigotravivaĵo en Novembro.....	19
Kvar muzeoj.....	10	Kie loĝas la kristnaska viro? .....	20
Artisto de Norvegio, al kiu ni (Margareta kaj Siv) konatiĝis dum la Skandinava kongreso, prezentas sin: "Fore de la modoj, kreemo estas mia pasio!" .....	12	Martinus, homo de la Paco.....	20
17-jara junulo regas pli ol 10 lingvojn .....	13	Pollando celebras 100 jarojn de sendependeco.....	22
Esperanto-kursoj en Francio 2019 .....	13	Några oktoberdagar vid den polska östersjökusten .....	23



## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estas neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

*La bildo sur la unua paĝo: La kobolda domo en Viktoria–Vasagatan.*





## EspePorko meditas

*Bonan Kristnaskon al ĉiuj!*

- \*\* Mi ĝojas, ke Ora Ĵurnalo ricevis reagojn de la legantaro, de Saliko pri la vortoj sameo kaj lapono kaj de Börje Eriksson pri ideo havi komunan nordian gazeton.
- \*\* Pollando vere povas organizi festojn... nun al la memoro de 100 jaroj de sendependeco.
- \*\* De Norvegio franc-norvega artistino sendis kelkajn bildojn. Eble ŝi havos ekspozicion en Lerum printempe. Kial ne ankaŭ en Gotenburgo? Ĉu vi havas kontakton kun galerioj?
- \*\* Ingegerd fotis la Koboldo-domon ĉe Vasagatan, Gotenburgo, kaj rakontas pri ĝia historio.
- \*\* La poeto Lisbeth H Johansson skribis du novajn poemojn, kiujn Inga Johansson tradukis en esperanton.

- \*\* Du vivkonceptoj havas lokon en la decembra numero: la Bahaismo kaj la Kosmologio de Martinus.
- \*\* Kvar esperantaj muzeoj estas prezentitaj: la muzeoj en Finnlando, en Ĉinio, en Francio kaj en Aŭstrio.
- \*\* TEJO serĉas volontulojn kaj Greziljono ofertas kursojn en aprilo.
- \*\* Ni antaŭdankas vin pro artikoloj pri diversaj temoj kaj de diversaj landoj – sed en esperanto!
- \*\* Aliĝu al la UK en Lahtio antaŭ 31 decembro por la plej favora kosto!

*Ĝis januaro!*



## Respondo al demando pri la vortoj lapono kaj sameo

de Raita Pyhälä (Saliko) el Finnlando por Ora Ĵurnalo

Pri la diferenco mi pensas tiel ĉi:

Laponoj loĝas en Laponio. Ili povas esti homoj enmigrintaj el la suda parto de la lando aŭ de ie alie.

Sameoj estas la aŭtoktonaj, originaj indiĝenoj. Ili ne nomis sian parton de la mondo "Laponio". Ili nomas ĝin Sápmi, la Samea lando, Samelando (vorto ne ankoraŭ ekzistanta en E).

Ili parolis almenaŭ plurajn sameajn lingvojn. Kelkaj loĝis en moveblaj "tendoj", aliaj en



loĝejoj faritaj el torfo, ili vivis nomade kaj interŝtataj limoj ne ankoraŭ malhelpis la migradon de boacoj kaj homoj.

Marbordaj sameoj vivis de fiŝkaptado. Bedaŭrinde la ŝtatoj Norvegio, Svedio,

Finnlando/Rusio en la 19a kaj 20a jarcentoj volis "nesameigi" ilin, devige instrui al ili la kulturon kaj lingvon de la ŝtato kie ili loĝis.

Nun pluvivas (iel tiel) nur 3 el la sameaj lingvoj. Granda parto de la sameoj jam loĝas

en urboj, sed ili fieras pri sia pasinteco.

La sameaj vestoj varias de loko al loko. Ankaŭ la pejzaĝoj varias. Vi en Svedio kaj Norvegio havas pli altajn fjäll (montegoj) ol ni en Finnlando. Mia filo membras en asocio de "Laponion-ŝatantoj" en Helsingfors kaj kun li mi 2–3 foje vizitis ilian kabanon en suda Laponio.



Sameaj lingvoj havas multegajn vortojn por diri, kiel iu moviĝas. Oni havas malsamajn verbojn por ekzemple la kuŝado de homo kaj la kuŝado de hundo kaj aliaj bestoj. Pri skiado oni uzas malsamajn verbojn, se oni skias sola aŭ grupe. Oni povas priskribi la neĝon kaj glacieron per centoj da vortoj, tiel detalaj ke estas planata scienca vortaro pri neĝo surbaze de de samea lingvo. Boacojn oni



priskribas per duonmilo da terminoj. Pri montoj kaj montetoj uzeblas pli ol cent sameaj terminoj, pri valoj kaj valetoj 60 esprimoj. Aliaj lingvoj bezonas tutan frazon por esprimi tion, kion sameo esprimas per unu vorto. Aliflanke, sameaj lingvoj ne havas multajn nomojn pri floroj kaj birdetoj. Samea lingvo estas mapo la samea realo. Ĝi povas malfermi al aliaj homoj la vojon al kompreno pri samea kulturo.

*Foto de pupoj en nordfinna vendejo. La vendataj vestaĵoj estas sameaj sed la pupoj tute ne aspektas kiel sameoj. Laŭ mi granda konflikto.*

Saliko



"Autoktona" el la greka vortoj autos (= mem, propra) kaj cthon (= tero). Autoktona estas ekz. indiĝena popolo aŭ integra rokaĵo (male oni nomas transportitan rokaĵon *alloktona*). Ĉu vi konsentas? /Siv

## Ĉu komuna Nordia esperanta gazeto, estontece??

Leginte la artikolon pri la malnova domo de Saliko, Börje Eriksson, Finnlando, meditas.  
(Mi prenas lian leteron de Meddelanden, Fejsbuko.)

Saluton Siv,

Kiam mi legis la artikolon de Saliko pri la domo, venis al mi la penso ke certe estas multaj interesaj artikoloj ankaŭ en la aliaj nordiaj ĵurnaloj kiujn mi fakte tre malofte, nur kelkfoje en la oficejo de EAF trafolumis.

Do, kiel estus se ni havus komunan Nordian ĵurnalon kun artikoloj kiuj povas interesigi multajn legantojn en ĉiuj nordiaj landoj? Krome ja povus esti kelkaj paĝoj speciale por la unuopaj landoj pri aferoj kiuj rilatas specifice al ili. Tio estus, laŭ mi, ankaŭ jam

bona komenco al multe pli internacia komunikado, unue inter la nordiaj landoj, eble poste iam ankaŭ ekz la baltiaj landoj povus aliĝi?

Kaj poste ĉiuj landoj ĉirkaŭ la Balta Maro! Sed tiam ja ni jam preskaŭ estus konkuranto al Ondo de Esperanto.... Tamen komencu ni almenaŭ kun iuforma interŝanĝo de artikoloj inter la nordiaj landoj! Fakte mi ne scias ĉu Islando havas propran ĵurnalon aŭ iun infoleteron paperan? Mi eĉ ne scias ĉu Ora Ĵurnalo aperas ankaŭ papere?




Mi dum venonta estrarkunveno de EAF parolos pri ĉi-tiu ideo, tio kompreneble ne signifas ke ni subite devas fari grandajn ŝanĝojn, ni unue komencu eble nur kun interŝanĝo de kelkaj artikoloj? Kion vi pensas? Kompreneble ĉiam estas demando pri homfortoj, sed eble tio donus novan inspiron al iu? Almenaŭ la finna Esperantolehti-bladet serĉas novan redaktoron.

*Börje Eriksson*



NORDISK TIDSKRIF

*Mankas Esperanta Nordia gazeto.*



*Komento:* La ideo estas loga, sed eble ni komencu per legado de la esperantaj gazetoj de niaj nordiaj najbaroj. Se vi en Nordio ŝatus kopii artikolon de Ora Ĵurnalo vi rajtas. Por venontaj numeroj de O. Ĵ. ni bonvenigas pliajn artikolojn de vi en Finnlando, Danio, Norvegio

kaj Islando. Se ni povas havi kontakton kun Samarkando ni ja povus havi kontaktojn kun niaj najbaraj landoj, ĉu ne? Ni certe ofte maltrafas eventojn ĉe vi. /Siv

## Kiu estis Bahá'u'lláh kaj kio estas bahai?

Prelego de Talieh Ashjari en la Esperantosabato 10 novembro.

Mi estas ordinara membro de la gotenbarga societo de la svedaj bahaianoj. Ni estas ĉ. 50 membroj el diversaj nacioj. Nia societo estas parto de la sveda unuiĝo, kiu estas parto de la internacia kongregacio. Ni ne havas gvidantojn, nek pastrojn, ĉar ĉiu homo povas mem kompreni la sanktajn tekstojn. La religio ne estu politika rimedo, sed vojo fariĝi pli bona homo. La prudento, la komuna saĝo regu. La bahaianoj administras sin per demokrataj konsilioj, elektitaj de ĉiuj membroj. Niaj infanoj povas mem decidi, ĉu ili volas fariĝi bahaiano. Nia ĉefa templo troviĝas en Israelo, sed la plej proksima estas en Frankfurto, Germanio.



*Talieh Ashjari. (La bildo estas de alia okazo.)*

Ni kredas, ke troviĝas eksteraj kialo kaj volo en nia ekzistado. Ĉio estas bona, ne troviĝas iu malbona spirita potenco. Ni kredas ke Dio sendis al la homaro je diversaj epokoj mesaĝistojn, kiuj paŝon post paŝo gvidas la homaron. Troviĝas komuna kerno en ĉiuj religioj, sed ĉiu religio koruptiĝas post iom da tempo.

Bahá'u'lláh naskiĝis 1817 en Teherano kaj mortis 1892. Tuj post kiam li komencis prediki pri sia kredo li estis malliberigita. Li estis ekziligita al Irako, al Turkio ktp. Sed ĉie li sukcesis

kolekti adeptojn kaj finfine li estis malliberigita en la prizonurbo Akko en Palestino, kie li mortis. Lia familio kaj multaj

adeptoj jam kolektiĝis tie kaj post la unua mondmilito ili helpis homojn kaj dank' al tio ili liberiĝis kaj la kredo disvastiĝis en la mondon. Sed ankoraŭ estas granda rezisto kontraŭ bahai, ekz. nun en Jemeno 24 bahaianoj atendas ekzekuton.

Laŭ la pensoj de Bahá'u'lláh troviĝas certaj signoj de la evoluado de la mondo. Unu signo estas ke la homaro elektos por si komunan lingvon, parolatan flanke de la gepatra lingvo. Eble esperanto estas tiu lingvo. En 1925 Lidia Zamenhof 21-jaraĝa fariĝis bahaiano. La bazaj konceptoj en esperanto kaj bahai estas similaj, kaj tio logis Lidian. Ŝi transloĝiĝis al Usono por disvastigi bahai, sed revenis al Pollando, kie ŝi estis murdita de la naziistoj.

Bahá'u'lláh diris, ke religio devas esti rimedo por krei amon kaj pacon; se ĝi kreas malpacon – forlasu ĝin. Bahai estas sen dogmoj, pastroj kaj ritoj. Homoj devas diskuti kaj interkonsenti. Ĉiuj religioj parolas pri



*Talieh en la Esperantosabato.*

estonta epoko, kiam la mondo unuiĝos. "La tero estas nur unu lando kaj la homoj ties nacioj. – Pensu globale, agu lokale. – Forlasu la antaŭjuĝojn." Li ankaŭ diris: "Se gepatroj havas nur du infanojn, filo kaj filino, kaj havas rimedon por edukado de nur unu infano – investu en la filino."

*Resumo farita de Andreas Nordström*

## LärOlika

(Lernu diversmaniere!)

Kial oni kreis LärOlika?

Oni konstatas, ke estas katastrofa manko de kontaktoj, renkontoj kaj kompreno inter homoj, kiuj apartenas al diversaj grupoj en la sama urbo! Antaŭjuĝoj formiĝas kaj kreskas. Kreativeco kaj novaj ideoj ne ricevas la eblecon evolui.

LärOlika startis en 2014 en Stokholmo de la organizoj Tällberg Foundation kaj Fryshuset. Postkodlotteriet apogis la projekton dum la tri unuaj jaroj. Ek de 2007



*La du gvidantojn Karin Bruce kaj Khaali Mohamed kiam LärOlika komencis la serion de kvin seminarioj en Gotenburgo en novembro 2018.*

LärOlika havas propran idealisman societeton kunlabore kun kelkaj diversaj organizoj.

Karin Bruce kaj aliaj faris gvidprogramon, kies bazo estas scivolemo pri nekonataj aferoj.

La programo celas doni al la partoprenantoj eblecon evolui kaj persone kaj kiel gvidanto en iu organizo. Kune ni

espereble influu sur la societo en nova inspira direkto. Legu pli en [www.larolika.se](http://www.larolika.se);

Fejsbuko: "lärolika"; E-poŝto:  
info@larolika.se

Mi ne memoras kiel mi havis la eblecon partopreni. Ne gravas – estas interesaj tagoj kun interparolo kun personoj, kiujn mi alie neniam renkontus. Kune ni ankaŭ diskutas valorjuĝojn kaj "dilemaproblemojn" por ekscii ĉu ni pensas same aŭ alie.

La unuan fojon Världskulturmuséet gastigis nin dum tuta sabato. La duan fojon Arabiska bokstavscentret estis la gastiganto.

Antaŭ la tria renkonto ni duope renkontos kie ni volus kaj interparolos pri memelektitaj aferoj. Kompreneble kun antaŭe nekonata persono.

La trian fojon ni vizitos la Sikh Temple Gurdwara, Sri Guru Singh Sabha, en

Hammarkullen, Angered. La kvaran fojon ni estos en Preera, Järntorget kaj la kvinan fojon Studieförbundet, Falkgatan 7, Olskroken.

Ĉio dirite en la kurso restas ĉe ni, por ke ni kuraĝu libere paroli. La partoprenantoj reprezentas diversajn aĝojn, diversajn profesiojn kaj diversajn etnajn grupojn kaj societojn. Oni trovas ke novaj mondoj troviĝas en Gotenburgo. Mi rekomendas vin aliĝi al LärOlika-kurso. Multaj el la nunaj partoprenantoj venis pro rekomendo de kolego aŭ geamikoj.

E-poŝto al Karin Bruce: karin@larolika.se,  
al Khali Mohamed: Khali@larolika.se

Bonŝancon!

/Siv

## La knabo kun la stelo de David

Ni estis kelkaj geamikoj kiuj aŭskultis Michael Ben-Mehachem, kiam li prelegis pri sia libro "Pojken med Davidsstjärnan" en la paroĥa domo en Angered fine de oktobro. La libro troviĝas nur en la sveda, sed ĝi valoras tradukon en esperanton.

Michael estas judo kaj devenas el Hungario. La libro ne rekte temas pri la ekstermo, sed tamen ĝi estas la fono de la travivaĵoj de Michael. La knabo ne komprenas la mondon kaj estas terurita de la ŝanĝoj kiuj okazas al li kaj lia familio. Michael rakontas varmkore tiel, kiel li igas nin rideti meze de la tragikaj aferoj.

La libro, kiu ampleksas 328 paĝojn, instruas nin ke post milito, koncentrejoj, politika



teroro, fuĝprovoj kaj riveladoj, oni tamen povas trovi sian vojon kaj fariĝi feliĉa homo.

Ŝajnas ke Michael estas unu el la lastaj homoj de la Renesanco: klinika psikologo, doktoro pri filozofio, profesia fotisto, artisto, ĝardenisto, velisto, subakviĝisto, kantisto kaj alie. Ĉi tiu libro estas lia naŭa. Temas pri lia infaneco kaj elkresko dum milito, mallibereco kaj persekutado, ĝis li havis 30

jarojn kaj renkontis sian amatan edzinon Elinor. Tiam Michael loĝis en Upsalo. Elinor venis el Usono por universitataj studoj en Upsalo.

Elinor ankaŭ ĉeestis la prelegon kaj helpis pri la vendado de la libroj.



La venonta libro de Michael Ben-Menahem???? Eble estos – kuirlibro. Tion li promesis al siaj filinoj. Estos kuirlibro por junaj familioj, kiuj havas malmulte da tempo por kuirado.

Fine estas du bildoj de Elinor kaj Michael, kiam ili estis junaj.

/Ingegerd



## Du poemoj de la verkistino Lisbeth H. Johansson, Gotenburgo

Inga Johansson tradukis en Esperanton

### Pri la verkistino

Lisbeth diras: "Mi skribis poemojn ek de la dua jardeko. Mi havas fil. kand-ekzamenon pri psikologio kaj estas ekonomisto DIHM (libera merkatekonomio).

Mi elkreskis en bieno, nomata Sandviken en la Ale komunumo, 60 km norde de Gotenburgo, 10 km de la palaco de Koberg. Mia patro havis bovinojn, ĉevalon, porkojn, ŝafojn kaj anserojn. Kiel infano mi ŝatis la naturon kaj florojn kaj kultivis multajn "eternelojn" (floroj, kiuj nature sekiĝas kaj povas flori "eterne").

Gimnastiko kaj la sveda estis miaj favorataj fakoj en la lernejo. La intereso pri floroj kaj mia intereso pri potplantoj restas, kaj mi



multe aŭskultas muzikon, prefere klasikan, popmuzikon kaj jazon kaj estas verŝajne "ĉiomangŭlo" koncerne la muzikon.

Mi lunde gvidas "Skrikkammaren" (la Skriba kabineto) kune kun Britten Hero kaj mi tre ŝatas skribi. Mi finis mian libron pri deprimado kaj psikiatrio, kaj volonte mi

vidus ĝin eldonita. Ni vidu ĉu mi estos tiel bonŝanca. Mi estas membro de "Västsvenska författarsällskapet" och "Göteborgs Skrivarsällskap" (du societoj por verkistoj).

Mi estas pozitiva kaj tre ŝatas aliajn kulturojn kaj homojn. Estas tiom pliriĉige!

Plej bonajn salutojn!"

Lisbeth H Johansson.

### Ett och ett är två

Man kan indela mänskligheten  
endast i två  
ett och ett  
de stora och de små  
inte etnocentrism, ras eller religion  
inte geografi, kultur eller segregation

inte svart eller vitt  
inte ditt inte mitt  
nej mycket enklare än så  
endast ett och ett som är två  
de som inte kan  
och de som kan förstå



### Unu kaj unu estas du

Oni povas dividi homaron  
nur je du  
unu kaj unu  
la egaj kaj la etaj  
ne etnocentrisme, rase aŭ religie

ne geografie, kulture aŭ apartige  
ne nigre aŭ blanke  
ne vian ne mian  
Ne, pli facile ol tio  
nur unu kaj unu kiuj estas du  
tiuj, kiuj ne povas kompreni  
kaj tiuj, kiuj komprenas

## Människans sorg La malĝojo de homo

### Det rinner blod

Det rinner blod  
efter husväggen  
Rött och sött  
flugorna gött  
och lusäggen  
Det rinner blod  
ner i gräset  
Röd vattnas marken  
mitt i stadsparken  
Det rinner blod  
från talande munnar  
Ord som ingen förstår  
eller kärlek unnar  
Det rinner blod  
på urtavlan där  
Högt på kyrkorummet  
där ömheten försvunnit  
Det rinner blod  
på gator och torg  
Men ingen förstod  
det var människans sorg

### Sango fluas

Sango fluas  
laŭ loĝeja muro  
ruĝa kaj suka  
muŝa kaj muka  
kaj la pedikovoj  
Sango fluas  
malsupren al herbo  
Ruĝa akvumiĝas la tero  
meze de la urba parko  
Sango fluas  
el parolantaj buŝoj  
Vortoj, kiujn neniu komprenas  
aŭ amo, kiujn neniu permesas  
Sango fluas  
tie sur la ciferplato  
Alte je preĝeja ejo  
kie la amemo malaperis  
Sango fluas  
en stratoj kaj placoj  
Sed neniu komprenis  
estis la malĝojo de homo

## Nova ekskurso kun birdobservantoj

Kelkaj e-klubanoj aniĝis al GOF – Göteborgs Ornitologiska Förening. Lastfoje estis ekskurso al Tofta, norde de Gotenburgo. Ni atendis mevojn kaj aliajn marbirdojn, sed ili eble ne ŝatis la novembran nebulan veteron kaj forestis. Sed survoje ni vidis almenaŭ tri

buteojn sidantajn sur laternofostoj. Eble ili atendis musojn mortitaj de aŭtoj.

En arbaro je la bazo de monteto kolektiĝis etaj malsataj birdoj.



Estas manĝilo tie. Mi estas vera amatoro pri birdoj. Sed mi vidis alian interesan beston: islandan ĉevalon, kaj por tiu travivaĵo mi ne bezonas tornon aŭ binoklon. La rajdanto

diris, ke islandaj ĉevaloj povas esti transportitaj de Islando al ni, sed neniam kontraŭe. Tiuokaze la ĉevalo povus kunporti bakteriojn. Strange, ĉu ne? /Siv



*Siv fotis.*

## Kvar muzeoj

### 1. Subtera Muzeo en Helsingfors

Jen foto pri la tegmento de nova muzeo Amos Rex en Helsingfors. La muzeo estas sub la tero, la "tegmento" estas je la stratnivele. Antaŭe tie estis ordinara placo/torg. Nun preterpasantoj ĝojas pri la "dunoj", grimpas, saltadas, rampas sur ili, amuziĝas. Mi ne ankoraŭ vizitis la enon de la artomuzeo, kiu estis konstruita de la fondaĵo Amos Andersson, fama alanda mecenato. Starante en la vestibla halo de la subtera muzeo, oni povas vidi super sia kapo la rondajn fenestrojn de la dunoj kaj iu alia povas vidi vin staranta subtere en la halo. Unu el la fenestroj aspektas kiel luno, se vidata de sube. /Saliko





## 2. Esperanto-muzeo en Ĉinio

La muzeo estas konstruita de Ĉina Esperanto-Ligo kaj Universitato en Zaozhuang kaj okupas 680 kvadratajn metrojn kun 26.000 kolektaĵoj. Promenu virtuale tra la Esperanto-Muzeo, ĝuante profesie preparitan tridimensian panoramon!

<http://zzait.com/quanjing/sjybwg>

## 3. Nacia Esperanto-muzeo en Gray, Francio

La Nacia Esperanto Muzeo de Gray, Francio, estis fondita en 1977 de Georges Junier, alinomata Géo Junier. La oficiala inaŭguro okazis en 1987, ĉeeste de la konsulo de Pollando. La muzeo ampleksas unu etaĝon de renovigita ekslernejo transformita en kultura domo (nun franclingve nomigita Maison pour Tous). Ĝi konsistas el dek ĉambroj, entute 230 m<sup>2</sup>.



La dokumenta teko enhavas proksimume 6 000 librojn kaj broŝurojn en esperanto aŭ pri esperanto, 1 400 revuojn kaj gazetojn malnovajn aŭ nuntempajn, originalaj manskribitaj dokumentoj de famaj

esperantistoj, inkluzive L. L. Zamenhof mem. Jaroj post jaroj la donacoj de famaj esperantistoj aŭ de asocioj (arkivoj aŭ personaj kolektaĵoj) disvolvigas tiun teknon.



La muzeo ankaŭ enhavas tekojn de diversaj esperantaĵoj: poŝtmarkoj, poŝtkartoj, reklamaj objektoj, teĥnikaj broŝuroj. /el Interreto

## 4. Vizito en Esperanta Muzeo de Vieno en 2018

Saliko (Raita Pyhälä) kaj Kerstin Rohdin vizitis la Esperanto-Muzeon en Vieno pluvoplenan tagon en novembro 2018. Post ioma interparolo kun Christian Cimpa en Esperanto ni estis tre amike bonvenigataj kaj ni lernis multon pri kio enhavas la muzeo: 60 postlasaĵoj (i. a. de Kalocsay, Schamanek, de Seabra, Seriŝev, Ŝirjaev, Wüster), 1.500 afiŝoj, 3.700 revuoj (diversaj titoloj), 22.000 fotoj, 35.000 volumoj kaj 40.000 flugfolioj. El tiuj fine de 2018 estas ciferecigitaj kaj konsulteblaj en interreto: 1.200 libroj, 1.200 jarkolektoj de revuoj kaj 1.000 afiŝoj.



Christian Cimpa en la Esperanto-muzeo kun Kerstin.



Ni hazarde vidis foton pri SEF-kongreso en Malmö 1955, sur kiu Kerstin rekonis siajn patron, Nils Olsson, kaj onklon, Olle Olsson. Ankaŭ aliajn partoprenantojn mi rekonis. Anna-Greta kaj Jan Strönne sidis en la unua vico.

Informojn pri la muzeo kaj ĝia enhavo vi povas gugli sub la titolo *Esperantomuseum Wien*. Serĉu! La materialo, kion vi povas trovi tie, estas tre interesa kaj povas plenigi kaj riĉigi plurajn "klubvesperojn". Vi povas lerni pri la vivo de Esperanto per tiu ttt-ejo. Vi povas serĉi inter la katalogitaj libroj kaj eĉ prunti per via loka biblioteko.

La muzeo pri "Esperanto kaj planlingvoj" situas centre en Vieno.

Vizitu kaj lernu en Esperantio!

Kerstin Rohdin, Raita Pyhälä



## Artisto de Norvegio, al kiu ni (Margareta kaj Siv) konatiĝis dum la Skandinava kongreso, prezentas sin: "Fore de la modoj, kreemo estas mia pasio!"



Mi naskiĝis en Parizo kie mi ricevis mian artedukadon. Post multaj vizitoj al Norvegio, mi decidis en 1983 ekloĝi en Rogaland, sudokcidente de la lando. Tie mi trovis vivkvaliton kaj amon. Mi amas ĉi tiun landon pro la trankvileco, la naturo kaj la lumo kiun mi ankoraŭ hodiaŭ trovas magia.

Mi prezentis mian arton en multaj personaj ekspozicioj en Norvegio kaj eksterlande. Dum la lastaj jaroj necesis por mi pro familiaj kaŭzoj tre ofte vojaĝi al Francio. Rezultis ke mi ne faris tiom da oficialaj prezentoj kiel mi dezirus. Tamen mi neniam ĉesis esti kreema.

Mia laboro reflektas la vivon kiun mi amas. Mi ŝatas sciemon, eklektikecon, precizon, fantazion, liberecon kaj belecon. Pro sciemo mi ŝatas vidi kaj lerni de diversaj kulturoj, kaj komuniki en Esperanto.

*Cécile*




*Vintra simfonio*



*Krepusko*





Fjordo



Amo



Edith Piaf

## 17-jara junulo regas pli ol 10 lingvojn

Kiam Martin estis infano Katalin Kovats raportis en Fejsbuko pri la lingvoscio de sia filo. La patra lingvo estas la franca, la patrina lingvo la hungara kaj la komuna lingvo esperanto. Ili loĝas en Nederlando kaj pli kaj pli la nederlanda prenis pli grandan lokon.



Katalin Kovats, redaktoro de Edukado.net, skribas en Fejsbuko



la 19an de novembro:

Martin, 17-jara, Angla ekzameno, kun la plej bona rezulto de la gimnazio el 71 lernantoj. Ni fieras. Li havas diplomon ankaŭ pri la japana kaj franca. Pri la greka li atingis pasintjare la 3an lokon landnivele, pri la latina la 12an kaj en la lingva olimpiado la 5an. Pri liaj aliaj 5–6 lingvoj mankas ankoraŭ atestiloj. 😊

### Esperanto-kursoj en Francio 2019:

## PRINTEMPOS

de la 26-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 2019  
en la kastelo Grésillon (Francio)

- \* Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj
- \* Aktivadoj kaj ekskursoj
- \* Prelegoj kaj atelieroj
- \* Trapasu esperanto-ekzamenojn (KER)

instruos, gvidos kaj prelegos :



Przemek Wierzbowski



Christophe CHAZAREN



Marion QUENUT

[gresillon.org/p](http://gresillon.org/p)



# TEJO – Tutmonda Esperantista Junulara Organizo



## VOLONTULU EN ESPERANTUJO!

Eŭropa Volontula Servo ĉe Edukado@Interreto

Ĉu vi...:

- estas vojaĝema, juna (18- ĝis 30-jara) esperantisto de Eŭropa Unio aŭ najbara al EU-lando?
- ŝatas aktive okupiĝi pri Esperantaj projektoj (ekz. organizado de arandoj - kiel Somera Esperanto-Studado, KAEST, LingvaFest', Polyglot Gathering - aŭ evoluigo de interretaj projektoj), Vikipedio kaj volas helpi la disvastigon de Esperanto?
- ŝatus dum 10-12 monatoj senpage loĝi en la Esperanta ĉefurbo de Slovakio kaj esti membro de internacia teamo, kiu ĉiutage laboras en Esperanto kaj por Esperanto?
- pretas dediĉi 1 jaron de via vivo por subteni agadon de E-organizo?
- deziras ekkoni Slovakion, ĝiajn kulturon kaj lingvon?
- volas renkontadi esperantistojn el la tuta mondo kaj kunlaboradi kun ili?



Volontulu por #Esperanto en Slovakio!

Danke al subteno de Eŭropa Unio, E@I gastigas junajn volontulojn en sia oficejo en Slovakio jam ekde 5 jaroj. Se vi ŝatus subteni la movadon kaj agadon de E@I dum 10–12 monatoj, ne hezitu, kandidatiĝu!

Kandidatiĝi rajtas ĉiu loĝanto de Eŭropa Unio aŭ najbara al EU-lando kiu aĝas inter 18 kaj 30. Rekompenco: 300 EUR/monate (pure), senpaga loĝado kaj veturkostoj por veni al Slovakio. Legu pli ĉe [evs.ikso.net](http://evs.ikso.net)

La projekto kovros interalie kostojn de:

- loĝado (en 1-2 personaj ĉambroj)
- manĝado (150 EUR monate)
- asekuro
- vojaĝo al kaj de Slovakio

Kaj aldone vi ricevos 150 EUR monate kiel poŝmonon!

**Iĝu parto de nia teamo!**



## EŬROPA VOLONTULA SERVO

demandu!  
[info@ikso.net](mailto:info@ikso.net)

kandidatiĝu!  
ju pli frue, des pli bone!



legu pli!  
[evs.ikso.net](http://evs.ikso.net)  
[tejo.org/volontulado](http://tejo.org/volontulado)

volontulu!  
dum 10-12 monatoj  
(ek-jam ekde aŭtuno 2018)

## Divenu la svedan urbon/lokon!



1. Sudohaveno
2. Lagonesto
3. Erikovilaĝo
4. Hufovirofarmeto
5. Nova ponto
6. Nova terlangohaveno

7. Nova urbeto
8. Brakumtorento
9. Veturildistrikto
10. Arbarohalo
11. Farunovilaĝo
12. Valolagotorento



La solvo troviĝas en paĝo 16.

Monica Eissing



# La Gotenburga Gazeto pri Komerco kaj Marveturado

Fabelo el "Götheborgiana" de Ingegerd Granat.



*S.A. Hedlund kaj Viktor Rydberg.*

– Viktor, trankviliĝu do!

– Ne taŭgas!

Jen la maljuna ĉefredaktoro S. A. Hedlund, kiu sidas antaŭ la "Kobolda Domo" en Vasagatan parolante kun la juna Viktor Rydberg.

Estas sunplena posttagmezo aŭtuna, kaj buntaj folioj falas de la arboj. Ili faris paŭzon tre bezonatan en sia laboro ĉe la gazeto. Tiel ili de malproksime prezentas bildon de io delonge pasinta. La blanka vangobarbo de S. A. Hedlund kaj lia cilindra ĉapelo prezentas la bildon de viro kun aŭtoritato kaj rondecu, dum la pli juna Viktor Rydberg silentas malantaŭ siaj malhelaj lipharoj pendantaj.

– Ne taŭgas, diras denove la ĉefredaktoro.

Ankoraŭ unu aŭtobuso kun ĉielarkaj flagoj ĵus preterpasis ilin. Estas "Fiereca festivalo" en Gotenburgo. La gajaj provokoj de la malsamaĵoj kaj la ĉielarkaj koloroj gargaras la urbon kaj klare montras, ke la tempoj aliĝis.

– Mi deziras vivi nun, diras Viktor Rydberg. Imagu, kiel alispeca estus ĉio, li pluiras kun songoj en la rigardo.

– Tiaokaze plej verŝajne ekestus nek "Singoalla", nek "La koboldo", do estas fortuna, ĉu ne, ke la tiamaj tempoj estis alispecaj, respondas la ĉefredaktoro.

– Tamen la libereco elekti, ĉu tio ne ĉion ege superas? Ke neniu legoj malhelpu la vivon

esti tia, kia ĝi estas? Jen rigardu! ekkrias Viktor Rydberg montrante per la fingro strangan figuron, kiu venas promenante laŭ Viktoria-Strato.

Akrakolora lippaŝtelo indikas la arkon de Amoro de la paŭta buŝo. Longaj nigraj okulharoj preskaŭ atingas buklon de la granda, ruĝe flamanta peruko. Grandaj ringoj pendas de la oreloj, sonoriĝas kaj tintadas unu kontraŭ la aliaj, formas unu tonon kune kun la altaj kalkanumoj, kiuj klakas kontraŭ la asfalta pavimo de la trotuaro de Viktoria-strato. La longaj kruroj traigitaj en retŝtrumpojn luktadas per moviĝi antaŭen en la kurta ledjupo, kiu firme ĉirkaŭas la maldikajn femurojn samkiel gipsbandaĝo, tamen antaŭeniĝas. La manoj de la longaj brakoj estas borderitaj de longaj ungoj pentritaj per akrakolora ungolako.

"It's just about love", zumkantas la originalulo pasante la benkon, kie la redaktoroj sidas babilantaj.

– Ne taŭgas, diras ankoraŭ unu fojon S. A. Hedlund al la pli juna viro, kiu dum sia infanaĝo preskaŭ apartenis al lia familio en Bjurslätt. Kiaj do estas tiuj ideoj, kiujn li nutris en si? Kiel tio ĉi nedirebla povis fariĝi tiel nevidebla, ke neniu ion rimarkis? Kiel li kapablis trompi ilin ĉiujn?

La ĉefredaktoro Hedlund fariĝas profunde singardema inter la tufaj vangobarberoj. Kiu do estas tiuj birdotimiguloj de la dudekunua jarcento, kiuj estas nek viro, nek virino, kiel ebligis? Malklereco, popolaĉo kaj kanajlaro, tiel li pensas, dum ankoraŭ unu aŭtobuso kun ĉielarkaj flagoj preterpasas la aperaĵon de la forpasintaj viroj el malnovaj tempoj sidantaj antaŭ la "Kobolda Domo" en Gotenburgo.

## S A Hedlund, 1821 – 1900



Dum la dua duono de 1800 estis S A Hedlund ĉefredaktoro de Gotenburga komerca- kaj martrafika gazeto.

En la urboparto "Bjurslätt" sur la insulo "Hisingen" li havis sian bonan somerdomon. Al tiu ejo, li invitis la konatajn personojn de tiu tempo. Inter la gastoj oni rimarkis la verkistojn Henrik Ibsen, Ellen Key, la feministinon Fredrika Bremer kaj la esplorvojaĝiston Andrée. La nomoj de ĉiuj estas gravuritaj sur la monto maldekstre en la fino de "Hällskriftsgatan". Tie situas ankaŭ "Källdalen", kie la ĝarden-interesata redaktoro plantis multajn diversajn arbojn.

La somerdomon en "Bjurslätt" oni malkonstruis antaŭ multaj jaroj sed la memoro de S A Hedlund kaj la Gotenburga komerca- kaj martrafika gazeto vivas ankoraŭ en la memoro de multaj Gotenburganoj.

Solvo de *Divenu la svedan urbon/lokon*:

1. Söderhamn
2. Sjöbo
3. Ljungby
4. Hovmantorp

5. Nybro
6. Nynäshamn
7. Nyköping
8. Kramfors

9. Vagnhärad
10. Skoghall
11. Mjölby
12. Dalsjöfors




## Viktor Rydberg 1828 – 1895

Viktor Rydberg estis unu el la plej gravaj verkistoj dum la fino de la deknaŭa jarcento. Iel li troviĝas inter Carl Jonas Love Almqvist kaj August Strindberg.

Liaj plej famaj verkoj estas "La koboldo" (Tomten) kaj "Singoalla".

Li ankaŭ skribis la faman poemon "La Stelo de Betlehem" (Stjärnan från Betlehem) kiun Alice Tegner muzikigis. Ĝi komencas per la vortoj "Gläns över sjö och strand" (Brilu super lago kaj strando).

Viktor Rydberg entombiĝis en la Orienta tombejo en Gotenburgo kaj por iu kialo estas malgranda koboldo preskaŭ ĉiam metita ĉe la granda tombo.



Jam mordas frost' de l'  
vintroz',  
la stelfajrero krozas.  
L' okulojn fermas songopez',  
la farmo nun ripozas.  
La lun' silente migras, sin  
la neĝ' briligas sur la pin',  
ĝi molan kovron formas.  
Nur la Kobold' maldormas.

Li grize staras ĉe la stal',  
li griza en la helo,  
rigardis multajn vintrojn al  
ĉi luno sur ĉielo,  
rigardas al la abiar'  
al domgardanta nigra bar',



Fine ni montras la bildon, kiun Hans Hedlund, **nevo de S. A. Hedlund**, donis pri Viktor Rydberg en la jaro 1920:

Ulo iom super mezalto, bonstatura viro kun volbforma brusto, granda kapo, kun fortika vizaĝesprimo, ŝtale grizaj iom brunaj okuloj. Ŝajnis ke ili atestis pri nokta maldormado kaj penigaj pensoj.

Konduto inda kaj kvieta, la vestoj estas korektaj, preskaŭ elegantaj. Okazas ke li traktis vizitantojn kun malhela rigardo por submetiĝo – ni interrompis lin en grava laboro. Sed se la vizitanto montras iom da intereso kaj bezonas konsulton aŭ helpon, lia rigardo lumiĝas.

/Ingegerd

### La koboldo

cerbumas sen la signo  
pri solvo de l' enigmo.  
  
La manojn boras li tra l' barb'.  
Kapskuas li: l' aferon  
diveni murmuris sub la arb'  
neeble ĉi misteron.  
Sed kiel ĉiam, post minut'  
forĝas li pri la tut',  
metadas, zorgas ĉion.  
Li havas profesion.  
  
En stalojn li eniras nun  
konatas ĉiu najlo.  
Bovinoj songas, (brilas lun')  
pri herbo sur la pajlo.

Forĝese pri la jung', vipiĝ'  
nun Pelle songas pri la riĉ'  
ke plenas ĝia trogo  
de bonodora drogo.  
  
Silentas l' arbarregion',  
La vivo froste mortas  
kaj nur la akvofaloso'n  
lacete sin alportas.  
Aŭskultas li en songsilent'  
pensante pri la temptorent'.  
Ĉu... Kien fluas l' ondoj  
kaj kieas la fontoj?

(V. Rydberg, tradukis Ferenc Szilágyi, Nordia Kantaro.)

## La kristnaska garbo

Mi havas poemon, kiun mi memoras de mia infaneco. Mi nur vidis ĝin unufoje, sed ĝi fiksiĝis en mia cerbo.

Estas poemo, kiun mi legis en kristnaskgazeto en la 1950-aj jaroj.

La akra tono en la dua strofo ne signifas ke mankis al la donacinto kompato kun malsataj

birdoj, sed eĉ unu eta avengarbo estis grava en malriĉa hejmo. Krome, estis certagrade malhonoro se oni ne elmetis "julgarbon", kaj oni ankaŭ kredis ke tiu maldonemo donus malbonan rikolton al la sekva jaro.

*Lasse Granat*

### La Kristnaska garbo

Se iu elmetas garbeton  
kiam estas malvarme kaj neĝ'  
tiel eble li savos koreton  
ĉinokte de mort' pro malsat'

Sed tio ne estas bonkoro  
li faras tiel sciante  
ke estas kristnaska bonmoro  
mizerikordon montrante.



## Pirola, kiun mi memoras


Kiam mi havis kvar jarojn mi ekhavis ilustritan poŝtkarton de mia avino de patra flanko.

Estas pirola kiu kantis se iu premus ĝin sur la brusto kaj mi tion faris kiam mi estis infano. Mi lernis la kantadon de pirola. Hodiaŭ mi konas kiel la pirola estas kaj mi havas jam manĝoviziton de pirolaj.

Mi vivas ĉe la rando de la arbaro en la domo kie mia avino naskis dekkvin infanojn.

Antaŭ longe alvenis poŝtkarto al eta knabino de sia avino.

Mi memoras ke mi ĝojis. La Pirola kantas daŭre. /Ingegerd



## Vintrotago

*Vintrotago en vintra vualo  
somero longe malfruos.  
Sur la blanka betula trunko  
aperas varmaj bildoj.  
La birdoj ĉirkaŭ la birdotabloj  
atendas varmon sur la tero.  
Printempo venos, Venu!  
kaj novaj floroj floros.*



Manĝokarto por birdoj:

*Semoj de helianto*

*Arakidoj*

*Pomoj*

*Kokosoleo*

*Graso de ŝinko*

*Panoj*

*Sebopilkoj*

Saĝa strigo petas vin! Ne forgesu manĝigi la birdojn! La birdoj bezonas multe da manĝaĵo dum la vintro.

/Ingegerd

## Strigotravivaĵo en Novembro



En 3/11 dum promeno ĉe rivero Sävån en Jonsered, Margareta Andersson kaj mi renkontis nian plej malgrandan strigon, la Paserostrigon (Sparvugglan).

Leif Lundvall sukcesis kapti ĉi tiun belan bildon de la strigo kun kaptiĵo.

/Strigosaluto de Jan Hellström



## Kie loĝas la kristnaska viro?

La finnoj certas ke la Julmaljunulo (finnland-svede: julgubben) loĝas sur la montego Korvatunturi en nordokcidenta Finnlando, sed la negastema loko havas konkurencon de Rovaniemi, kie oni ekde 1998 havas amuzparkon nomata Santa Park. Delegacio de Rovaniemi altpelas en EU por ke Rovaniemi estu sankciita kiel la hejmloko de la Julmaljunulo.

En Danio ĉiu infano scias ke "Julemanden" loĝas en Gronlando.

*En Norvegio kaj Svedio verŝajne ne gravas kie la kristnaska viro loĝas. Nur gravas ke li venas.*

Kristnaska Viro aŭ Paĉjo Kristnasko estas traduko de diverslingvaj versioj de fikcia kristnaska donacoportanto, kies fonto origine estas la figuro de Avo Frosto aŭ Sankta Nikolao. *Santa Claus*, estas nordamerika angligo de la nederlanda "Sinterklaas", kiu laŭvice estas formo de "Sankta Nikolao". "Paĉjo Kristnasko" estas esperantigo de la brita angla *Father Christmas*.



Estas multaj kristnaskaj kantoj en ĉiuj kristanaj landoj. En Anglio, kie ili nomiĝas *Christmas Carols* (kristnaskaj karoloj), ili konsistigas grandan nacian tradicion, regule kantitaj de infanaj ĥoroj.

En Brazilo, unu konata kristnaska kanto estas jena:

Papileto tre bela  
Kiu restas en rozejo  
venu por vidi kiom da ĝojeco  
Ĉar hodiaŭ estas kristnaska nokto  
Mi estas papileto  
Tre bela kaj ĉarma  
mi restas inter la floroj  
atendante kiu amos min.

*En Brazilo nun estas somero. Papilion ni en la Nordio tute ne ligas al Kristnasko.*

*Mi prenis la informon ĉefe de Interreto. /Siv*

---

En Finnlando la julmaljunulo nomiĝas *joulukko*, jul-maljunulo, aŭ *joulupukki*, jul-virkapro. La lasta estis origine viro vestita kiel virkapro, sed nuntempe la vorto plejofte estas sinonima kun julmaljunulo. /Andreas

## Martinus, homo de la Paco

De Börje Eriksson Lahtio, Finnlando pri Martinus.

Kiam mi rigardas reen sur mia 75-jara vivo, mi klare vidas, ke ne povus esti alie ol tio ke mi komprenas la mesaĝon de Martinus kiel pacan aferon. Por pli interesataj troviĝas amaso de materialo de kaj pri Martinus interrete. (martinus.dk).

Martinus naskiĝis ekstergeedze kaj i. a. tiu fakto igis lin, jam kiel infano, dubi pri kelkaj ekleziaj konceptoj pri peko, kulpo, kredo, sufero, morto kaj simile. Tamen Martinus

restis membro de la eklezio. Preĝo estis por li gravege.

La paskan semajnon 1921, kiam Martinus estis 30-jara, li sidiĝis por mediti. Li ricevis kelkajn fortajn spiritajn travivaĵojn, kiuj ŝanĝis lian tutan vivon. Lia konscio plivastiĝis, tiel ke eterna perspektivo kaj pli poste li povis science klarigi en li klare vidis la evoluon de la tuta universo el maniero, ne antaŭe vidita.



## Intuicio kaj intelekta pensado


Kiel oni nomu la verkadon de Martinus? Nova religio ĝi absolute ne estas. La vorto "kosmologio" pli ofte estas uzata, sed troviĝas alie ol kosmologio ĉe Martinus. Filozofio? Ne, la mezaĝo de Martinus ne estas elpensita de li, eĉ ke li trapensadis ĝin. Revelacio? Eble, la scienco de Martinus baziĝas sur intuicio, ne nur intelekta pensado.

Martinus diras ke lia elirpunkto estas la "parolo de la vivo", sed ke li venas al la sama vidpunkto pri kiu la Biblio rakontas en la tiama maniero. Sed religia mondbildo, bazita sur sentoj, ne povas savi la homaron. Aliflanke la evoluo de la intelekto povas konduki al materialismo kaj nesocia konduto. La materialisma scienco ne tute povas solvi la misteron de la vivo, nek per mikroskopo nek per teleskopo. La malsato pri solvo de la vivo estas de spirita naturo.

Martinus rigardis la mondon per la okuloj de Dio: "Ĉio estas tre bona" kaj ĉio baziĝas sur absoluta ĝusteco kaj amo. Per la reinkarniĝo kaj la leĝo de karmo, ĉiu suferado ricevas sencon. Ĉio, kiun ni faras kaŭze de eraroj kaj bestaj impulsoj, de kiuj ni ankoraŭ ne liberiĝis, ni mem rikoltos.

## Evoluo al paca mondsocieto

La nuna situacio de la homaro ne estas sekvo de hazardo. Post vivo en la minerala kaj herba regionoj, la homo nun troviĝas en la lasta fazo de la bestoregno. Konkurado, batalo, mortigo, milito apartenas al la fina etapo de la bestoregno.



De la emocie sonora admono "Amu vian proksimulon!", kiun ĉiu klera humanista kaj religia predikanto proparolis, Martinus faras sciencajn vojpriskribojn. Li logite montras, ke tio estas la sola valora irvojo, se oni volas labori por paco en la mondo. Laŭ Martinus la evoluo al paca mondsocieto antaŭeniras, malgraŭ la

katastrofoj, kiuj devas veni antaŭ tio.

Martinus ankaŭ rekomendas transiron al vegetarismo, kaj pro sano kaj pro etikaj kaŭzoj. Nia proksimulo ne nur estas homoj, sed ĉiu vivantaĵo, en plantoj, bestoj kaj en la homo mem, en la organoj, en mikroorganismoj, same kiel en la makrokosmo de la universo.

## Homo kun du polusoj povas ami ĉiujn

Speciala afero, pri kiu Martinus parolas estas "la polusa transformiĝo", laŭ kiu la evoluo iras de unupolusaj seksaj estaĵoj al dupolusaj estaĵoj, pro tio ke la sekundara poluso (la femala ĉe la viro kaj la maskla ĉe la virino) evoluas tiel ke tute dupolusa homo estiĝos, kiu povos ami ĉiujn sendepende de sekso. La seksa amo estas formo de "la plej alta fajro" kaj spertas transformiĝon de egoisma impulso al ĉuamo.

Ĉi tiu evoluo, kiu malgraŭ rezisto, jam estas tute videbla, ekzemple je la akcepto de la seksa variececo, la aktuala "metoo"-ondo, la alia kompreno de geedziĝo kaj la strebo por la egaleco de la seksoj, okazos dum longa evolucio, kaj ekstremaj elreliĝoj okazos. La polustranformiĝo estas premiso por ke paco inter homoj kaj inter popoloj realiĝu.

Börje Eriksson estas pensiita ĝardenisto kaj aktiva esperantisto. Li havas fonon en i. a. Emmaus, kvakerismo, antropozofio, biodinamika kulturo. Li laboris 1955 – 1974 kiel ĝardenisto en Tapolan kyläyhteisö (vilaĝkomunumo) en Orimattila kun mense handikapitaj plenkreskuloj. Li fondis la

societon Pro Esperanto – por ekologio, esperanto kaj kulturo de la koro. Nun li okupiĝas pri la Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio en julio 2019.

La artikolo estis publikigita svedlingve en la finnlanda Fredsposten 2/2018.

Foto: Börje Eriksson

## Pollando celebras 100 jarojn de sendependeco

Karaj,

Hodiaŭ (12 nov) la tuta Pollando festas 100-jarojn de sendependeco. Tiel festas homoj en Gdansko.

Do, elkoraj salutoj okaze de la festo.

*Elvira*





# Några oktoberdagar vid den polska östersjökusten

*Post monato, en oktobro, Jan Hellström kaj Margareta Andersson refaris la vojaĝon al Pollando por povi vidi pli da birdoj. Jen lia raporto en la sveda.*

## Dag 1

Margareta Andersson och jag flög från Landvetter den 12/10. Vi landade redan efter 50 minuter i Gdansk.

När man fyllt 70 år, så åker man gratis buss och spårvagn i Polen. Så vi gick ut till bussen för en tur till hotellområdet i Oliwa. Övernattade på samma hotell, som under esperantoresan i september, Ratusz B&B. Det ligger mycket nära den stora fina Oliwaparken.



## Dag 2

Lördag och marknad bakom hotellet. Bönder kommer dit och säljer sina jordbruksprodukter som potatis, ägg, inlagda gurka, frukt, bär, svamp etc. I övrigt säljs kläder m.m.

Sen tog vi tåget till centralstationen i Gdansk och bytte till buss som på 35 min förde oss till Fågelparadiset Ptasi Raj, där floden Wisla möter Östersjön.

Vi njöt av en god hälleflundra till lunch utomhus på restaurangen (se bild) och kunde samtidigt se en flock stjärtmesar i ett träd och en segelbåt på floden.

Ptasi Raj är ett stort reservat med ett antal strövstigar i barr-, bok- och annan lövskog.




Dessutom finns stora vassområden, en sjö, flera fågeltorn och en stor sandstrand vid Östersjön.

Mätta och belåtna efter den utsökta lunchen tog vi oss på en stig ut till en lång stenpir i flodarmen. Där låg stora flockar med vigg och sothöns. I vassarna visade sig korta stunder skäggmesar.

Sedan valde vi en stig genom skogen. Eftersom det var lördag, mötte vi många som promenerade, cyklade, gick stavgång, gick med barnvagn. Spår efter vildsvin fanns i skogen.

Kom fram till den långa sandstranden vid havet. Få badade, mest gick de längs stranden eller låg i sanden. Margareta tog tillfället till ett kort dopp.




Innan solen dalade blev det en avstickare genom skogen till en annan del av stranden där det gick vidare, kustsnäppor.

I skogen hördes både talltita och tofsmes.



Efter mycket motion i sommarvärme, frisk luft och för Margareta ett kort dopp tog vi bussen tillbaka in till Gdansk.



### Dag 3


Söndag och morgonmessa i Oliwakatedralen (kan anas längst in i ovanstående bild).

Efter frukost på hotellet blev det en busstur till Sopot, en badort granne med Gdansk.

Sedan en vandring genom villaområden, kolonistugeområde och upp till Esperantoeken. Samtidigt kom det ett ungt par från nordöstra Polen. Margareta tog



tillfället att engagerat berätta för dem om eken och om esperanto.



*Minnesstenen vid Esperantoeken (se Ora Ĵurnalo nr 9, s. 4).*

Nere på Skogstadion mötte oss svensktalande Ewa, som visade oss stigen upp på de skogklädda höjderna och till en utsiktspunkt, där vi såg ner över Sopot och skymtade Gdynia på avstånd. Vi gick genom guldskimrande bokskog till skidliften, där vi såg bort mot Gdansk (se bild nästa sida). Vildsvinen hade bökat upp marken här uppe.







Vandringen gick i skymningen ned förbi skogsoperan (en amfiteater med tak omgiven av grönska).


Efter ytterligare en fin dag i sommarvärme, tackade vi Ewa och tog bussen tillbaka till Oliwa.

### Dag 4

Tåg till Gdynia med byte till ett annat tåg som förde oss till ändstationen Hel längst ut på den långa Helhalvön, som sticker ut i Östersjön.



Vi gjorde en lokal rundtur udden med ett elfordon. Chauffören, som bara kunde polska, stannade vid olika minnesmärken.



Bakom grinden (bilden) syns en del av det största och modernaste polska kustartilleribatteriet före kriget. Det var utrustat med fyra Boforskanoner. De ersattes efter kriget av sovjetiska kanoner och lades ned 1977.

Efter en god lunch i solen på en utomhusservering, tog vi en promenad vid havet och in bland bebyggelsen. Lite svårt att gena mellan de stora hyreshusen, på grund av stängslen runt dem.



Till slut hittade vi ett kolonistugeområde, och kom så småningom ut i skogen med sanddyner och betongvägar, som påminde om dess militära historia. Vi såg bl.a. enkelbeckasin och stjärtmesar i skogen.

På väg tillbaka till tåget, passerade vi en kyrka, där sången strömmade ut genom högtalaren. Vi gick in en stund i kyrkan, som var välfylld under vespersn.

Sen var det skönt att ta tåget tillbaka till Gdansk efter en lång och solig dag.

### Dag 5

Checkade ut på hotellet och tog bussen till ett italienskt hotell. Här skulle vi bo den sista natten.

Sedan till en spårvagn.

När spårvagnen från Oliwa kom till hållplatsen vid operan hördes utdrag ur en opera i spårvagnens högtalare. Kanske något för Västtrafik att ta efter för den busslinje, som har hållplats vid Göteborgsoperan. Vid

centralstationen i Gdansk tog vi bussen till Ptasi Rai, Fågelparadiset.

Liksom vid förra besöket här började vi med lunch utomhus vid restaurangen. Sommarvärmen höll i sig.

I skogen sedan mötte vi inte så många personer, som förra gången, eftersom det var vardag nu. Några svamplockare kom med sina hinkar.

Nu styrde vi stegen till ett fågeltorn intill en sjö. Här sågs bl.a. 3 ägretthägrar. → Uppe i nästa fågeltorn vid en flodarm sågs stora sjöfågelflockar. Se bild på en bergand! Framme vid sandstranden vid Östersjön passade vi bägge på att bada bland blåmaneter. Skönt med ett dopp. Några vadare längs stranden. En flock tranor sträckte in från Östersjön.



Sen tog vi bussen tillbaka från reservatet efter en fin dag med god mat, motion, bad, frisk luft och fåglar.




## Dag 6

Onsdagen den 17/10, hemresedagen.

Började med en god frukost på den italienska restaurangen på hotellet.

Sedan buss några hållplatser och promenad runt en sjö med spår av vildsvin. Se bilden på sjön! Vi gick sedan en bit längs en väg bort från tätbebyggelsen. Såg spår av mullvad på en gräsmatta.



Tillbaks till hotellet för utcheckning. Margareta utanför hotelldörren.



Nu när vi lärt känna området och busslinjerna rätt bra var det dags att resa hem efter några sköna dagar.

Vi tog oss med vår buss till hållplatsen för flygbussen. Grönsaksförsäljning vid hållplatsen!

Med flygbussen anlände vi sedan i god tid till flygplatsen i Gdansk.



Tack Polen för denna gång!

/Vid pennan Jan Hellström